

HISPANA

ESPERANTO - BIBLIOTEKO

celas eldoni jare dekdu kajerojn, ĉiu el ili 32 paĝa almenaŭ, kun sama formato 13 1/2 × 19 1/2 cm., pri literaturo, historio, legendoj, arto, k. c., de Hispanujo, kun ilustritaĵoj foje, sur luksa papero, por havigi al la Esperantistaro interesajn malkarajn legotaĵojn, kiel atestas ĉi tiu verko; tamen ĝi povos aperigi rimarkindajn fremdajn tekstojn.

Ĝi lotos belegan ORAN MEDALON de la VI Hispana Kongreso de Esperanto en Madrid po ĉiu centoj da abonantoj, krom DU binditaj kolektoj (1917-1922) de «Hispana Esperantisto».

Ĉiu samideano, sendinte DEK kotizojn el DEK abonantoj varbitaj de li, fakte estos konsiderata abonanto rajtanta la loton.

El la preparitaj verkoj estas: *du* noveloj de Cervantes, tutmond-fama aŭtoro de DON KIĤOTO; tradukitaj poemoj hispane verkitaj de famaj gepoetoj; mirindaj poemoj originale esperante verkitaj de Rafael de San Millan, k. c.; «Postrikolto» kun dudekdu poemoj el diversaj lingvoj, tradukitaj esperante de A. Grabowski, k. c.

Abonu, abonigu kaj propagandu la Bibliotekon, petu specimemon por konvinkiĝi sendante *du respondkuponojn*.

JARABONO

(DEKDU KAJEROJ)

Fremduloj: 7 Fr. sv., aŭ egalvaloro en hispana mono.

Amerikanoj: 1 dolaro.

Enlandanoj: 7 pesetoj.

TORRENT KAJ KOMP^{IO}

VALGAME DIOS. 6

MADRID



PRI HISPANUJO
KAJ ĜIAJ POPOLKANTOJ.
POPOLKANTARO
DE MURCIA

6252



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Aĉetu la jenajn verkojn de la sama aŭtoro:
HISPANA GRAMATIKO PRI ESPERANTO. ĉi tiu lernolibro estas la plej simpla konciza kaj efika por hispanlingvanoj, kaj eĉ la plej malkara: 75 centimojn.

HELPANTA TEMARO POR LERNIGI RAPIDE ESPERANTON, kiun oni povas uzi en ĉiuj landoj, ĉar ĝi estas verkita tute esperante kaj kiu estas laŭ recenzintaj gazetoj («Heroldo de Esperanto», k. c.) unu el plej bonaj kaj kompletaj lernolibroj: 0,75 Fr. sv., por fremduloj; 75 centimojn, por enlandanoj kaj amerikanoj. Mendante samtempe ambaŭ verkojn, enlandanoj havigos ilin al si po *unu* peseto kaj 10 centimoj; amerikanoj po *unu* peseto kaj 25 centimoj, kaj se oni mendus *kvin* ekzemplerojn el ĉiu verko, po sama prezo kia por enlandanoj.

AVILA, kun historia kaj arta priskriboj, kun biografioj pri S. Tereso de Jesuo kaj la fama episkopo Alonso de Madrigal, kaj kun 30 belaj ilustritaĵoj sur luksa papero, kun 64 paĝoj: *unu* Fr. sv., por fremduloj; *unu* peseton, por enlandanoj kaj amerikanoj.

FERDINANDO VI KAJ FARINELLI, historia novelo proze kaj verse verkita, alloga rakontaĵo meritinta bonan prijuĝon de la recenzintoj, kun 32 paĝoj, luksa papero: 0,70 Fr. sv., por fremduloj; 70 centimojn por enlandanoj kaj amerikanoj,

Tuj aperos **EL MODERNA HISPANA PARNASO**. La Grupoj, Asocioj, k. c., devas aĉeti plenan kolekton de la grava gazeto «Hispana Esperantisto» de la jaro 1917^a al la 1922^a, ambaŭ inkluzive, kun nombregaj ilustritaĵoj pri la rimarkindaj arkitekturaĵoj de Sevilla, Burgos, Segovia, k. c., kun tre interesa teksto sur luksa papero. La kolekto estas belega granda volumo: 20 Fr. sv., por fremduloj; 25 pesetojn, por enlandanoj kaj amerikanoj.

HIMNO DE HISPANA ESPERANTO-ASOCIO, versaĵo de de D-ro Zamenhof «Preĝo sub la verda Standardo», muzikaĵo de J. Seva: 2 pesetojn.

MAN
mi

HISPANA - ESPERANTO - BIBLIOTEKO
HISTORIO - ARTO - LITERATURO - TRADICIO - BELAJ NATURAĴOJ - K. C.



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio
Rodríguez San Pedro 13 - 3^o - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079

PRI HISPANUJO

KAJ

ĜIAJ POPOLKANTOJ
POPOLKANTARO DE MURCIA

ORIGINALE KAJ ELĈERPITE VERKITA

DE

JULIO MANGADA ROSENÖRN

PREZO: 1 Fr. sv.
(TRI RESPONDKUPONOJ)


ADRESO:

GLORIETA DE BILBAO, 5. — MADRID
HISPANUJO

2529



Ricardo Codorniu

A decorative flourish consisting of several overlapping, swirling lines that extend horizontally across the width of the signature.

ANTAŬPAROLO

Ami patrujon, sentante profunde kaj kore regionemon kaj samtempe amon al la tuta Homaro, praktikadis la unua hispana esperantisto, S-ro. Ricardo Codornú; tial mi volas honori lin per ĉi tiu libreto, aperigante lian portreton por edifo al ĉiuj, des pli pro la teksto pritraktanta kantojn de regiono, kiun li multe amis, kie li multe laboris, de kie li konstante apostoligis:

KVAZAŬ PREĜO


Se vi iam al la kampo irus,
Kie arboj kreskas foliplene,
Kaj se vi vin sentus senĉagrene
Kaj revante—kiel mi dezirus—;
Vi jam aŭdus kiel se sopirus
Iu dolĉe, milde eĉ bonvene.

SCIU:

De Ricardo Codornú,
Jes, de lia la animo
Dolĉa milda la esprimo
Estus ĝi, kaj ne sopiro
De l'fervora Homamanto
Kaj fidela Pioniro
De la lingvo Esperanto.
La murmuro de la vento tra l' folioj,
Kantoj de la birdoj; de la akvo, plaŭdo
Ĉe la rokfluejoj, estas harmonioj
Grandiozaj kaj entuziasma laŭdo
Pri la vivo de l'ingeniero fama,
Kiu, familien, estis ja modelo;
Por la «Kolegaro», nobla kaj homama,
Preta ĉiam por hompliboniga celo.
Homoj, birdoj, arboj kaj la plantoj,
Bonon ŝuldas lin;
Kaj dankemaj, kvazaŭ preĝoj, estu kantoj,
Ĉar jam lin forportis la DESTIN'!


FORMADO DE LA TERITORIO

Laŭ pravaj geologiaj studoj, kvin masoj el arĥaikaj kaj granitaj rokoj formis la skeleton (tiel oni povas diri) de la tuta hispana terpeco: I.^a, *Kataluna*, malvasta, negrava, laŭlonge la nuna marbordo kaj la Pireneo, sed ne laŭ la nuna direkto de ĉi tiu montaro; II.^a, *Galica*, aŭ nordokcidenta, entenante la tutan regionon, kaj nordan Portugalujon, vastega, gravega; III.^a, centra, de *Kastilujo*, ankaŭ vastega kaj gravega; IV.^a, subokcidenta, konsistante el masetoj de Córdoba kaj Huelva laŭ direkto S. Or-N. Ok.; V.^a, sudorienta kun malgrandaj masetoj — Almería, Málaga, Granada, laŭ nuna marbordo. Ĉe la vastegaj kavoj inter tiuj masoj de l'preskaŭinsula skeleto formiĝis sedimentaj tavoloj, kambriaj kaj siluriaj tavoloj, *primariaj tavoloj*:



vastaj *mesetoj* (plataĵoj) de la Malnova kaj Nova *Kastilujoj*; en la Pirenea montaro kaj Suda Aragono, iuj makuletoj; ankaŭ vastaj kaj karbaj tavoloj ĉe Asturias, León, Palencia, Santander, multe malpli vastaj ĉe Burgos, Ciudad-Real, Teruel, Córdoba, Sevilla, Lérida, Barcelona.


Formiĝis sekundaraj teraĵoj en la direkto N. Or., paralele je la nuna kataluna marbordo, formante malgrandan kaj mallarĝan parton de l'nuna kataluna teritorio.



Terciaraj kaj kvaternaraj teraĵoj formiĝis ĉe la tuta valo de la rivero Ebro kaj ĉe la nuna kataluna regiono ne tre malproksime de l'nuna marbordo.

Montaroj formiĝis koincidante kun terciaraj kaj kvaternaraj teraĵoj kaj mesetoj; kaj la kontinentaj aŭ istmaj

Pireneoj, ĉe la parto de Navarra kaj Katalunujo koincidas kun la terciaraj teraĵoj; vaskaj Pireneoj, kun la sekundaraj; montaroj Carpetana, de Toledo, Marianica kaj parteto el montaroj de la kataluna marbordo, kun la primariaj.



Je la tria periodo, prahistoriaj lagoj estis la plej granda parto de la valo de l'rivero Duero kaj valoj de la riveroj Tago kaj Guadiana, kaj ili estis interkomunikiĝantaj; apartaj kaj plej malgrandaj, tiuj de la riveroj Ebro kaj Guadalquivir.

La tavoloj, de la centra meseto al la marbordo, stariĝis laŭ diversaj terzonoj ne atingante grandan larĝecon, kaj ili aperas en ĉiujn

direktojn laŭ sama ordo: plej malaĝaj ĉe la marbordo. Jen kiel Kastilujo estas, do, kvazaŭ kerno de la Preskaŭinsulo, kiu formiĝas kaŭze de du elartikigitaj fortoj obeantaj du malsamajn direktojn, tujn de la Eŭropa kaj Afrika kontinentoj. Ĉi tiuj du grandaj fortoj kaŭzis du enprofundiĝojn, kaj tial movon de la hispana terpeco, kiun siavice ĉu forto el la du tiris al si, restigante videblajn sekvitaĵojn, du tervastaĵojn, kiuj montras klare linio de l' promontoro Finisterre al Baleara insularo: la eŭropa forto kliniĝas de la promontoro, de l' N. Ok., al S. Or.; la afrika, de N. Or. al S. Ok., sed ili ne influis ekskluzivege, decide.

Je la fino de la primaria aŭ paleozola epoko, ekzistis granda montaro en la okcidenta parto de Hispanujo, de l'N. Ok. al S. Or. ĝis la rivero Guadalquivir, kiel vertebra kolono de la preskaŭinsula terpeco, al kiu aliĝis, dum la sekundara kaj terciara, teretaĵoj formante la kernon, sed je la fino de la terciara okazis kataklismoj ŝanĝante la preskaŭinsulan terpecon.

La maro, je la fino de la kretosa periodo retiriĝas iom post iom de la centro; tiel, ke dum la eocena periodo nur estis subakvigantaj la Pirenea regiono (istma) kaj valo de l'Ebro, ĉe la N.; regiono de Valencia kaj tiu de l'Algarbes, ĉe la S. Antaŭ ol finiĝi la eocena periodo, elstariĝas la Pirenea reliefo; la maro preskaŭ forlasas la tutan teritorion de la Preskaŭinsulo; ĉe la S. reliefiĝas la montaro Bética, unuigas insuloj, eroj el nuna marborda montaro, reliefo elsubakviginta kaj kunigita kun Afriko kaj apartigita el aliaj terpecoj de markolo iranta de l' promontoro Nao al la valo de la rivero Guadalquivir.

Ekstariĝas la ĉefaj elementoj de la nuna orografia sistemo. Elsubakviginte la centra parto de la Preskaŭinsulo, estis la tuta valo de l'Ebro maro limigata de la eknaskiĝanta istma Pireneo, Norden; de la centra meseto de Kastilujo, Suden. Ĉe la Sudo la ĵus formiĝinta montaro Bética estis tiam parto de Afriko, kaj inter ĝi kaj la centra meseto estis la markolo aludita kunigante la Mediteraneon kaj la Atlantikon, kaj samtempe la Baleara Insularo estis parto de la montaro Bética.

Je la miocena periodo, formiĝas lagoj ĉe la centra meseto, vastega ĉe la valo de l'Ebro kaj granda parto de Katalunujo, kaj ĉe aliaj regionoj. Kaj je la fino de tiu ĉi periodo la montaro Herciniana rompiĝas, tra la fendegoj fluas akvo de la lagoj, kiuj senakviĝas; formiĝas nova skeleto de la lando el serio da montaroj kaj mesetoj; la maro malantaŭeniras malrapide kaj la montaroj Penibética kaj Pirenea (istma) elstariĝas aperante vulkanoj en Olot kaj Gata.

KIEL ONI DEVAS NOMI LA LANDON

Jam oni vidis kiel la hispana teritorio estis kunigata kun la afrikaj kaj certe iu nova kataklismo kaŭzis la profundan fendegon de la gibraltara markolo, eble la sama kiu malaperigis la *Atlantidon*. Estas do nedubeble, ke samaj gentoj de la sama raso loĝis ĉe la droninta istmo kaj teritorioj kunigataj de la istmo, kaj ĉi tion elpruvis komparata prahistorio de la teritorioj de la Norda Afriko kaj Suda Hispanujo, kaj eĉ oni povas ampleksigi ĉi tiun opinion al primitivaj loĝantoj de la Kanaria Insularo. Ĉio atestas, ke la *berbera* raso estis la unue loĝanta en Hispanujo, la primitivaj indiĝenoj; raso nombra, loĝante de tre prahistoria epoko ĉe la Norda Afriko, de *l'Fazan*, malnova *Fazanio* de la Romanoj, ĉe *Tripolitano*, ĝis la markolo de Gibraltaro kaj la atlantikaj marbordoj de Maroko kaj pli nombre ĉe Alĝerio kaj Maroko, ĉi tie proksimume je kvar milionoj; la *Berberoj* sin konservis puraj ĉe la marborda kaj montara teritorioj, de *Tanger* ĝis insuloj *Chafarinas*, konante ilin per la nomo *amazigas*, kaj kies ĉefa karakterizo estas nekontraŭstarebla ribelo kontraŭ ĉia jugo. La berbero estas tute blanka tipo, kiun oni povas konsideri vere eŭropa kaj konfuzi kun andaluzia kaj sicilia, indiĝenoj, multaj estas blondaj.

La Egiptoj reprezentis ĉi tiun rason, kiun ili alnomis *Tamahu* aŭ *Tamehu*, kaj kiu signifas *atlantidojn, homojn de la Oceano*, per blanka koloro kaj bluaj okuloj, por diferencigi ĝin el la *Bot'* aŭ Egiptoj de ruĝa haŭto; el la *Naum'* aŭ flavuloj, kaj el la *Naxu'* aŭ nigroj, kies kvar rasoj estas reprezentataj en la tomboj de *Biban-el-Moluk*. Proksimume 1600-1400 jaroj antaŭ Kristo, pli precipe je la tempo de Merenpta, la Egiptoj vidis alvenantajn ĝis Memfis la *Tamahu'ojn* komandatajn de princo nomata Morumin; sed Merenpta venkis la *homojn de la maro* kaj eĉ forpelis ilin el Egiptujo, kaj pri ĉi tiu milito pridiras 77 kolonoj kun hieroglifoj deĉifritaj de Rougé, kaj la hieroglifoj konstatas ke Merenpta venkis la *Tamahu'ojn*, inter ili la *Sardanas'ojn* kiuj estas prauloj de la *Sardos*, gento de *Libio*, kiu tre antikve etendiĝis ĉe la Norda Afriko, de Egiptujo ĝis Maroko, kaj kiun estis transportanta al insulo *Cerdeña* la filo de la *Libia Herkuleso*, *Sardo*, laŭ la legendo. Sed la Berberoj reatakis la Egiptojn dum la tempo de Ramses III.^a, laŭ atestas reliefoj de *Medinet-Abu*, partopreninte la novan invadon la *Masnas'* aŭ *Amazigas*; prapatroj de la nunaj; sed la Faraono ankaŭ venkis ilin.

La Berberoj formis la nombran loĝantaron, kiu dum la transiro de la paleolita periodo al la neolita loĝis ĉe la grotoj de *Andaluzio*, *Extremadura*, *Portugalujo* kaj aliaj regionoj, ĉar ili disvastiĝis sur la tuta Preskaŭinsulo; raso dolikocefala de *Cro-Magnon*, raso inteligenta, kies kranio estas longa kaj mallarĝa, el kiu estas reprezentantoj: la homoj blondaj kun bluaj okuloj de la Montaro de Ronda, kaj de aliaj lokoj de Andaluzio, kiuj persistadas spite de ĉiuj invadoj, de la okjarcenta militado por forpeli la maŭrojn, kaj de la Renesanco, konservante ĉiujn karakterizojn de la raso, kiujn ĉi tiu havis de antaŭ pli da 3.500 jaroj, tiel samaj, kiel tiaj de la Berberoj, ke oni ne povas dubi pri la sola kaj antikvega deveno de tiuj kaj ĉi tiuj, deveno antaŭa je la invadoj *ibera*, *helta*, *germana* kaj *mahometana*, kaj fremdaj je la influo de la araba restado; kaj la nunaj Vaskoj hispanaj, *eksterordnare sendependemaj kaj ribelemaj kontraŭ ĉia jugo*; ankaŭ estas atestantaĵoj pri ĉi tiu raso la mumioj de la *Guanches*, aŭ unuaj loĝantoj de la Kanaria Insularo kaj ĉi tio alkondukas opinii, he antaŭ la malapero de la istmo kaj kuniĝo de la atlantika kaj mediteranea maroj kaj malapero de la *Atlantido*, el kiu la Kanaria Insularo estas restaĵo, Berberoj estis la loĝantoj de tiuj insuloj same kiel de Maroko. Aliparte, la komparo de la megalitaj monumentoj de Portugalujo, Andaluzio kaj aliaj regionoj de Hispanujo kun tiuj de la Norda Afriko, konstatas, ke la Berberoj estis loĝantoj de Hispanujo antaŭ ol la Iberoj; multe pli antaŭe, t. e., indiĝenoj de Hispanujo.

Estas erare, do, pretendi ke la Iberoj estis la unuaj loĝantoj de la preskaŭinsula terpeco, ĉar vere tiu ĉi *aria* popolo estis invadanta kaj almitanta parton el la teritorio, veninte de *Iberio*, kaŭkaza regiono, hodiaŭ la nuna *Georgio*. Ĉi tiu popolo, irinte laŭlonge la sudan bordon de la *Nigra Maro*, traŭrinte la *Bosforon* kaj *Tracion*, suprenirinte la valojn de la riveroj *Drave* kaj *Danubo*, atingis la Nordan Italujon, la valon de la *Rodano*, la atlantikajn marbordojn de Francujo kaj eĉ Irlandon, pasinte ankaŭ en nian landon, okupinte parton el ĝi, sin lokuminte definitive ĉe la nordorienta, orienta kaj suda regionoj, atinginte, ĉe ĉi tiu lasta regiono, la sudan parton de Portugalujo, prefere apud la grandaj riveroj kaj mediteraneaj marbordoj, formante nombrajn tribuojn aŭtonomajn aŭ sendependajn. Kiel sekvo de tiu invado, je 1.300-1200 jaroj a. K., de tiu almito kaj de tiu restado de la *Iberoj* ĉe la okcidentaj regionoj de Eŭropo, ĉi tiun parton de nia Kontinento oni nomis ankaŭ *Iberio* same, kiel nian Preskaŭinsulon,

tute senfundamente tiam kaj nun ĉar, plie, la *Iberoj* ne okupis, kiel estas dirite, la tutan Preskaŭinsulon; tial, kvankam ili estus nomintaj *Iberio* tutan teritorion de la Preskaŭinsulo, ne estas tio fundamento por anstataŭi per tiu nomo Hispanujon. Atentu ke la *Iberoj*, konservante agrablan memoron pri la forlasita patrujo, kutimis doni la nomojn de siaj riveroj, montaroj, urboj, k. c., kiujn ili ŝatis, al riveroj, montaroj, k. c., de la lando almitita: la Montaro *Aralar* rememorigis al ili *Monton Ararat*, kiu, laŭ la tradicio, estis la dua lulilo de la Homaro, tial ke sur ĝi restis la Arkeo; la rivero *Arasces*, kiu naskiĝas ĉe la piedo de la citita montaro, ŝuldas sian nomon al rivero *Araxes*, kiu estis landlimo inter Armenujo kaj *Iberio* (nuna *Georgio*); la nomoj *Ebro*, *Arga* kaj *Aragón*, rememorigas la riverojn *Ibero'* kaj *Arago'*; la *Iberoj* nomis la persan lagon, inter la lago Van de Armenujo kaj la Kaspia Maro, *Urumea*, kaj ĉi tiu estas la nomo ankaŭ de la milda rivereto fluanta tra la pentrinda valo *Loyola*, apud *San Sebastián*, rivero bananta la domaron de ĉi tiu urbo, de la *Perlo de la Kantabra Maro*, tradicie de la *Bela Easo*, ĉe la marenfluejo; la rivero *Orio* aŭ *Oria* estis nomata antikve *Aturia* same, kiel rivero enfluanta en la riveron *Tigris*. La urboj de la primitiva orienta *Iberio* nomataj *Maranda*, *Deba* kaj *Degia*, estas rememorigataj de *Miranda de Ebro*, *Deva* kaj *San Esteban de Deyo* (alinome *Monjardin*), apud *Estella* ĉi tiu lasta. Plie la regado de la *Iberoj* ne estis certe absoluta ĉe la regionoj almititaj, ĉar alimaniere ne estus estinta eble konservi sin tiel pura la blonda berbera tipo de la *Montaro de Ronda* kaj de aliaj lokoj de Andaluzio, kaj ĉi tio konstatas la sendependeman berberan karakteron kontraŭ ĉia fremda jugo.

La Keltoj, el ibera deveno, estis gento, kiu forlasis *Iberion*, kaj, suprenirinte la montaron *Urales'*, iris sin loĝigi longedaŭre ĉe la antikva *Escitio*, de kie tiu ĉi gento revenis kaj sekvis la vojon de siaj iberaj fratoj. Same, kiel ĉi tiuj, la *Keltoj* donis al riveroj, montaroj, promontoroj, regionoj kaj urboj, samajn nomojn je tiuj de la teritorioj de *Azio* el kie ili eliris: la gento *Taporos de Lusitania* rememorigas la *Tapuros'n* aŭ genton, kiu loĝis inter la *Maro Aral* kaj la *Montoj Celestes (Ĉielaj)*; la tribuo el la *Asturicanos* de *Circasia*, kiu loĝis inter la *Maro Azof* kaj la *Kaukazo*, sin starigis ĉe parto de *Asturias* kaj *Leon*, kaj ĉe alia parto sin starigis la *Pescicos*, kiuj devenis de la *Maro Aral*, de la *Kaspia Maro* kaj de la *Montoj Oxios*, kaj ankoraŭ restadas la *asturia* vilaĝo *Pezos*, atestante la teritorion *Pesico*, citata de *Plinio*; la nomo

Vinnio aŭ *Vindio*, kiun oni donis al parto de la *Pirenea Montaro* parto konsistanta el *Montaroj de Albas* kaj *Sejos* kaj *Ŝtonego Labra*, estas tiu de montaro de *Hindujo*; *Cantabria* rememorigas la landon *hindo-escitika* inter la riveroj *Indo* kaj *Hidaspes*, ĉe kiu staras la montego *Cantabras* el la sudaj montaridoj de la *Himalaya*. La Keltoj okupis el la Preskaŭinsulo parton el *Cantabria*, *Asturias'n*, parton el *León*, *Galicja'n* kaj *Portagalujon*, la montarajn regionojn de la Nordokcidento kaj marbordojn de la *Atlantiki Maro*, ĉar ĉi tiu gento estis montarloganta. Sed oni povas demandi: ĉu la *Keltoj* okupis kaj regis la regionojn de *Cantabria* aŭ la karaktero tro sendependema je ĉia jugo de la *Vaskoj Berberoj* haltigis ilin? Ĉi tio lasta estas verŝajna, despli reala, tio estas, la *Kantabroj* rezistis la *Keltojn* same, kiel ili ĉiam poste rezistis ĉiujn invadantojn, kaj tiamaniere ili rezistis, ke la *Romanoj*, por esprimi ke io estis neebla aŭ almenaŭ tre malfacila, diris: «tio estas same kiel devigi la *Kantabrojn* prezenti la dorsojn al la kontraŭulo». La *Keltoj* same, kiel la *Iberoj*, vivis laŭ aŭtonomaj aŭ sendependaj tribuoj. Interkonsentoj kaj kunligoj inter *Iberoj* kaj *Keltoj* kunigis tribuojn el ambaŭ popoloj, kiuj okupis la centran parton de la Preskaŭinsulo, formante la *Keltiberan Popolon*, sed ankaŭ ĉi tiu popolo vivis laŭ aŭtonomaj aŭ sendependaj tribuoj.


Krom ĉio dirita, sciante ke la glacio invadis Eŭropon, ĉe *Hispanujo* ĝis iom sude de la centra parto, facile estas konscii, ke la homo loĝis en la suda parto, ke li venis ĉiam de *Afriko*, laŭ natura vojo de homa disvastiĝo, en la Nordon laŭ la glaciejoj fandiĝadis, kaj ĉi tio ankaŭ alkonformiĝas al la konkludoj de la komparata prahistorio de Maroko kaj Hispanujo.

Tial ke la unuaj loĝantoj de *Hispanujo* ne estis la *Iberoj*, nek la *Keltoj*, kaj tial ke neniu el tiuj gentoj regis la tutan teritorion de la Preskaŭinsulo, oni ne povas akcepti *Iberion*, *Keltion* aŭ *Keltiberion*, kiel nomojn de la Preskaŭinsulo; nek adjektivojn *iberan*, *iberikan* kaj konceptojn *Iberismon*, *Iberoamerikanismon*, k. c., laŭ la ampleksa senco kiun hodiaŭ oni donas al ili.

Oni devus akcepti *Hesperio'n* pli bone ol *Iberion*, ĉar tiun nomon oni donis je la antikveco al la tuta Preskaŭin-ulo, nomo fremda je ĉiu milito, konkiro, subpremado; male, poezia nomo, kiun donis al ĝi la *Grek j* por difini la landon de Okcidento, trans kiu malaperadas la suno, kaj kiu estis tiam la limo de la Mondo konata de ili, tial ke super ĝia horizonto, je la sunkuŝiĝo, restis *Vespero* aŭ *Hespero (Venuso)*. Estas

iu supozantaj, ke oni donis tiun nomon al la tuta okcidenta Eŭropo, de la *Adriatika Maro*; sed ĉi tio estas nur neakceptinda supozo, ĉar la *Grekoj* certe ne donis la nomon al najbara lando, sed al la malproksima, al tiu de la horizonto aŭ limo de la tiama Mondo, super kiu vidiĝis Venuso je la kuŝiĝo de la reĝa astro.

Ĉiujn romanajn provincojn de la Preskaŭinsulo entenas la nomo «*Hispania*», donata sekve al la tuta Preskaŭinsulo, vorto devenanta de la grekaj «*ispania*» kaj «*spania*», kiujn latinigis la *Romanoj* sed kies etimologio venas de plej antikva origino. Oni forlasis, ĝenerale, opinion pri deveno el la fenicia vorto «*span*», kiu signifas «*kuniklo*», pro kio oni konsideris la Preskaŭinsulon *lando abunda je kunikloj*. Sed studante la etimologion de «*Hispania*», oni konstatas, ke tiu nomo estas



la propra kaj ĝusta por la tuta preskaŭinsula teritorio, ĉar la nomo estas sekvo de ĝia geografia situacio kaj de ĝia formo: la kelta vorto «*span*» havas saman radikon kiel la germanaj «*spann*» («*piedo*»); «*spanne*» («*manplato*»); «*spannen*» («*ampleksiĝi*»), kaj «*spannung*» («*deirloko*»), kaj efektive, la Preskaŭinsulo estas kvazaŭ *piedo de Eŭropo*; ĝia teritorio estas, laŭ sia formo, kvazaŭ *manplato* de dekstra

mano al kiu oni estus amputinta la kvin fingrojn, kaj por tion ĉi konscii desegnu dekstran manon prezentantan la manplaton al vidanto kaj kun la kora fingro suben laŭ la vertikala linio kaj kun ĉiuj fingroj malfermataj streĉite kiel eble plej, kaj jen:

La manradiko estas la kuniĝo kun *Francujo*; la radiko de la dika fingro, de la promontoro *Ortegal* al promontoro *Finisterre*; tiu de la montra fingro, la promontoro *S. Vicente*; tiu de la kora fingro, *Tarifa*; tiu de la ringa fingro, la promontoro *Gata*, kaj tiu de la malgranda fingro, la promontoro *Nao*. La Preskaŭinsulo estas kvazaŭ *ampleksiĝo streĉita* («*spannen*») de la Eŭropa Kontinento preter limon, kiu oni povas konsideri la *Pirenea Montaro*; ankaŭ ĝi estas kvazaŭ *deirloko* («*spannung*»). Se oni koncernus la anglan vorton «*spanner*» («*entiro*» aŭ «*ŝlosilo*»), tute klare oni konscias, ke ĝi estas *enirejo de Eŭropo* kaj de la *Mediterranea Maro* kaj *ŝlosilo de ĉi tiu*. La nomo «*Hispania*» alkon-

formiĝas, do, kun la formo kaj situacio de la preskaŭinsula teritorio; ĝi estas donita de la Naturo mem, ne de la kaprico aŭ volo de tiu aŭ alia el la popoloj venintaj al ĉi tiu terpeco kaj ĉi tie sin lokumintaj, kaj tiel oni povas klarigi kial *Portugaloj*, amante la grandan «*Unuiĝon ĉe la vario*», pri kiu diris la eminentega hispana Pi Margall, malaprobas *iberismon*, ĉar ĉi tiu estas por ili submetiĝo de popolo sub popolo, kaj kial ili ŝatas *hispanismon*, ĉar ĉi tiu estas male por ili, kiel *supernaciismo*, ĉar ĉiam ili sin konsideris *Hispanoj*, kaj ĉie oni nomis ilin *Hispanoj*. Tial oni konscias ankaŭ, ke la fama portugala historiisto Oliveira Martins vidu ĉe la tutmond fama verko de Camoens «*Os Lusadas*» «*la blazonon de la Historio de la tuta Hispanujo*» (*ne de la tuta Iberio*), tio estas «*la esencon de la preskaŭinsula genio*», laŭ diris la eminenta kastila verkisto E. Gómez de Baquero; ke la aludita portugala historiisto, pritraktante la religian signifon de la poemo diru: «*ĝi ne estas aparta, sed ĝenerala; ne ĝuste portugala, sed PRESKAŬINSULA aŭ HISPANA*», tial ke li trovas en la kuraĝa patrujamanta sento de la poemo *tiom da kastila kaj aragona senco, kiom da portugala*. Nia Preskaŭinsulo estas, do, la *Hispana Preskaŭinsulo*, ne la *Iberia*: ĝi estas HISPANUJO!

De la esperantista vidpunkto des pli ni devas ŝati Hispanujon, ĉar ĉi tiu vorto estas pli internacia ol *Iberio*, entenas ankaŭ plej ampleksan koncepton samtempe neŭtralan koncerne la partojn, kiuj formas la tuton, alkonformiĝante tial al la spirito de Esperantismo, al la «*interna ideo*».

VARIECO ĈE HISPANUJO KAJ ĜENERALA INFLUO DE KASTILUJO KIEL KERNO DE LA TUTA LANDO

La Naturo ĉiam estas saĝa, kaj homo neniam devas agi kontraŭ ĝi, sed ĝin profiti eĉ imiti, ĉar ĝiaj leĝoj estas nekontraŭstareblaj, tial nur pasio kvazaŭ frenezeco, blindigante la homan konscion, povas gvidi iun al iaj diroj kaj agoj kontraŭaj je tio, kion Naturo starigis. La centra parto de Hispanujo, laŭ estas pruvite, estas *Kerno* de ĉi tiu, tial tute natura estas la influo de la *Kerno* sur ceteron de la Preskaŭinsulo, kaj tiel evidenta estas la influo, kiel konstatas la jenaj vortoj de la klerega kaj fama kataluna ĵurnalisto Gaziel aperintaj sur la grava ĉiutaga ĵurnalo «*El Sol*» (Madrid) de la 5^a de decembro de 1925: «*La spirito de Kastilujo estas io, kio estas unika en la mondo. Tio estas tute malsama je ĉio ajn alia. Tio estas unu el tiuj maloftegaj fruktoj por la fremduloj,*

ekskluzivaj fruktoj de iu tero, kaj de iu atmosfero (medio-klimato), kiuj samtempe ankaŭ estas ekskluzivaj, kaj kies gusto ne plaĉas al palatoj, kiuj ne gustumadis ĝin aŭ estas antipodaj je ĝi.

«Multfoje kaj de antaŭmulte, loĝinte en Kastilujo dum kelke da tempo kaj min enprofundiginte iomete, izole, en ĝiajn spiritajn radikojn, mi pensadis pli elokvente ol sukcese, en Katalunujo, instrui kaj elpruvi la krudan sed nekompareblan belecon de la kastila spirito al miaj plej bonaj amikoj.

«Mi diras nekomparebla, ĉar vere nenio estas komparinda je ĝi. Oni amos aŭ malamos la kastilan spiriton; sed ĉi tiu estas nura, unua kaj unika inter la popolspiritaj. Se ĝi perdiĝus, se oni povus forigi ĝiajn restsigojn de sur la Historio eĉ ne lasante ian restaĵon, iuj ĝojus, aliaj malĝojus, sed nedubeble estus ambaŭokaze, ke la mondo perdis *ion esencan pro ĝia neanstataŭebleco. La valoro de Kastilujo estas unika, ĉu bona, ĉu malbona, kaj ĝi estas precipe kaj samtempe ĝia mojesta grandeco.* Ĝi estas unu el kvin aŭ ses fundamentaj koloroj de la eŭropa suna spektro.

«...ĉia intenco pri renaskigo aŭ strukturigo, ne nur hispanaj, sed tutpreskaŭinsulaj, bezonas esence la konsenton kaj kunlaboradon de Kastilujo. Sen Portugalujo kaj eĉ sen Katalunujo, la hispana spirito kaj realeco persistados pli-malpli same kiel hodiaŭ; sed sen Kastilujo, kvankam Portugalujo kaj Katalunujo kaj la ceteraj regionoj interkonsentus pri preskaŭinsula idealo, ĉi tiu estus vana kaj neutila. Pro sia geografia situacio (*Kerno*, mi diras), pro sia propra vasteco kaj pro la teritorioj kiujn ĝi logas al si mem, pro sia tutmonda bonfamo, pro sia instinkto pri hierarkio, Kastilujo daŭradas estante la ŝlosilo de la tuta Preskaŭinsulo.»

Samtempe Naturo estis tre malavara al nia tuta teritorio, ĉar ĉi tiu estas tre varia eĉ ĉe distanco el kelkaj kilometroj, prezentante same ĉe la nordo, kiel ĉe la centro, kiel ĉe la sudo, de la kverko kaj arboj de la norda Eŭropo en la citronarbon, palmon kaj sukerkanon; de la ĉiamdaŭra neĝo en la kelkfoje tropikan varmon.

Montaroj kaj valoj, ebenaĵoj, lumo, aero, akvo, klimato, k. c., estas eroj el tio, kion ĝuste oni nomas *spirito de la teritorio*, kaj ĉi tiu estas kvazaŭ krisolo en kiu homo fariĝas. La preskaŭinsula terpeco estas vario ĉe unuiĝo, la varieco koncernas ankaŭ la *spiriton de la teritorio*,

kaj tial ĝian produktitaĵon, *la homon*; kaj se la *spirito de la teritorio* varias, kvankam posedante komunan parton, jen kial la Preskaŭinsulo dividiĝas nature laŭ terporcioj donantaj al iliaj loĝantoj specialajn karakterizojn krom tiuj komunaj karakterizoj al ĉiuj Hispanoj. Sekve, oni povas konscii facile, ke la hispanaj popolkantoj estas variaj, belaj kaj riĉaj same, kiel varia, bela kaj riĉa estas la tutlanda teritorio, ĉar ankaŭ la lingvoj kaj dialektoj estas variaj, belaj kaj riĉaj. Ju pli milda, belsona kaj flua estas lingvo aŭ dialekto, des pli popolkantoj estas malakraj, homamaj eĉ ĉiomamaj. La lingvo de la nordokcidenta parto de Hispanujo, de *Galicja*, same kiel tiu de *Asturias*, estas mirinde belsonaj, mildegaj, ĉar multfoje forigas ili la konsonantojn; lingvo de ĉielulinoj estas la kastila lingvo parolata en Andaluzio; dolĉaj tiuj de Valencio kaj de l'Vaskoj; belsona, flua, ĉu serioza algrade, aŭ milda kaj sentiga, la hispana (Kastila); nur la kataluna lingvo estas la plej akra kaj forta, sed tamen ĝi perdas grandparte sian akrecon kaj fortecon per la kanto. Kial, do, la popolkantoj ne montriĝos samaj kiaj estas respektivaj lingvoj? Nur ĉe la kataluna regiono, freneza kaj malsaĝa pasio naskis himnon plenan je malamo al ceteraj Hispanoj, kaj tiu pasio ne rajtas kalumnii la hispanajn popolkantojn dirante sur eldonitaĵo pri katalunaj popolkantoj, ke ĉi tiujn ne influis profunde tiuj «*eble ĉar ili (hispanoj) enhavas foje sencon de akreco kaj krueleco*»; sed feliĉe, la malsaĝa kaj freneza pasio ne enradikiĝis ĉe la plimulto el la Katalunoj.

Neniu hispano sentas tiel profunde regionemon kiel la galiciido (ido de *Galicja*); lia nostalgio pri la naskiĝloko estas eksterordinare rimarkinda. Ĉi tiun melankolion sentas ne nur la indiĝenoj, eĉ ĉiuj, kiuj trairas la kamparon de *Galicja*, ĉar la homa spirito ĉiam restas iel pli-malpli intense aŭ forte altenate al la lokoj en kiuj la inspiro de l'Kreinto amasiĝis sian maksimuman povon por la belo. Oni sentas nostalgion pri naskiĝloko kvankam ĉi tiu estu nuda roko; sed, kompreneble, kiam la naskiĝloko estas paradizo, tiu sento nepre estas pli tirana. Tiu sento tiras al morto multajn galiciidojn; kaj neniu poeto el ĉiuj hispanaj regionoj trafis kanti ĝin tiel kiel galicia poetino Rosalía de Castro (1).

Kion diri pri la ceteraj kantoj? Ĉu vi ne aŭdis pri la andaluziaj kantoj? Ĉu vi ne aŭdis pri la «segidiljoj» de la opero «Carmen», de Bizet, pri la nombregaj kantoj de Andaluzio, ĉu gajaj ĉu sentigaj, kortuŝantaj, kiel tiuj famaj kantataj de geandaluziidoj antaŭ la Virgu-

(1) Sur unu el venontaj kajeroj aperos ŝia poemo.

lino aŭ la Krucumito dum la tutmondfamaj procesioj de la Sankta Semajno? Ĉi tie mi volas priparoli pri milda, alloga, ravanta kanto, kiun mi aŭdis unuafoje en Sevilo post la nacia Kongreso de Kordobo, dum festo organizita de la Sevila Grupo je la honoro de la vizitantoj: estis seksteto el gitaro, sonoriletoj, speciala instrumento el lado, kiun oni gratas per metala stangeto, kaj produktante pli-malpli raŭkan sonon, kaj kruĉo de akvo, kies buŝon la ludanto frapas ritme kaj takte per kanabpantoflo por trafi unuton cimbalan sonoron. La ludistoj samtempe kantis. La kanto devenas de la araboj, kaj oni ĝin kantas dum religiaj procesioj kaj eĉ por festi la amatinojn je la tagiĝo meze de la majesta trankvileco; kaj vere, je tiu horo, en tiu kvieteco de la andaluzia tagiĝo, sub la delikata bluaĵo de la ĉielo, iom palblua kaj opala ĉe la ekrozkoloriĝanta horizonto, rezultas ravega. Jen unu el la strofoj kiujn mi aŭdis (la kanto-strofo estas laŭ la celo):

«Jen sonoriletoj apud via
pordo, ili vokas vin kaj mi;
kaj ni vokas vin je l' horo dia
kiel amoj, kiujn sendas Di'»

La kruĉo, kiun oni ludas, estas amforforma, kun kolo kies diametro estas malgranda; se oni plenigus diversajn kruĉojn pli-malpli el akvo certe oni atingus diversajn tonojn el cimbala sonoro.

Ĉu vi ne aŭdis la aragonan kanton, la «ĥoton» («*jota*», elparolu *ĥota*?) Ĉu vi bone konsciis pri tiu mirinda kanto, kiun alproprigis al si aliaj multaj regionoj, plibone ĉiuj Hispanoj? Tiu ĉi kanto mirinde trafas ĉiajn sentojn de la kortuŝanta en la gajan, ŝercan kaj heroan aŭ epopean, kiel kuraĝiga himno por ĉi tiuj lastaj okazoj; ĝi trafas koron ĉies, ĉiam kaj ĉie! Jen iuj strofoj:

«Ne esperu, ne, forflugu
de la koro miaj ĝemoj;
«ĥot'», ĉu gaja aŭ ne estas
laŭ de la kantant' korpremoj.»

«Sen vi, kiel kun vi, same
ne ŝanĝiĝos malbonsorto:
kun vi, ĉar vi min mortigas;
sen vi, venos mia morto.»

«Mi, pinglaro akra, trovas
la okulhararon vian;
kiam vi min rigardadas,
ha! ĝi pikas koron mian.»

«De vi sopiroj venantaj,
de mi irantaj sopiroj,
se ĉe la voj' rekontiĝus,
amaj rezultus la diroj.»

«Same kiel birdoj kantas
de la amo la ĉagrenojn,
per la *ĥoto* mi mildigas
de la mia kor' anĝenojn.

Sed ankoraŭ mi konstatos la influon de Kastilujo sur la popolkantojn de aliaj regionoj per gravega argumento: proksimume samtempe naskiĝas diversaj lingvoj en la preskaŭinsula parto liberigita el la maŭra regado. Tri por la nordokcidenta parto: *bable*, malmulte parolata ĉar ĝia teritorio estas malvasta, *Asturias*; *galica* kaj *portugala*, mildaj lingvoj, ĉiuj formas familion, havante grandajn similecojn. Alia familio el tri lingvoj, kun simileco je la franca kaj itala lingvoj samtempe, naskiĝas en la orienta parto de la Preskaŭinsulo: *Kataluna*, *Valencia*, kaj tiu de Baleara Insularo, la unua estas pli konciza kaj sinteza kaj ankaŭ havas similecon kun la provenca lingvo, malpli milda ol la valencia. Inter ĉi tiuj grupoj el tri lingvoj, persistadas la vaska lingvo, unu el plej malnovaj, kies originon oni ne konas kaj kiu certe estas la lingvo de la primitivaj berberaj loĝantoj de Hispanujo; kaj estas rimarkinde, ke ĉi tiu lingvo dividiĝas je tri dialektoj, tiuj de Vizcaya, Guipúzcoa kaj Navarra (prononcu Vizkalja, Gipuzkoa). Ankaŭ naskiĝas la kastila lingvo, kiu vere ne devenas de la latina, ĉar la fonetiko kaj la strukturo de ambaŭ lingvoj ne estas la samaj kaj la parenceto de la kastila kun la araba estas granda. La kastila lingvo, naskiĝinte ĉe la *keruo*, pro sia plej granda vivoforto, disvastiĝis eĉ influis pli kaj pli la ceterajn, eble ĉar la grundo en la regionoj, en kiuj naskiĝis la aliaj lingvoj, estis favora dank' al jarcentara restado de la maŭroj, kaj eĉ ĝi influis la vaskan. Ĉi tio estas tute natura rezultato, kaj la kastila lingvo fariĝis oficiala lingvo de la nacio, ju

pli la tempo pasadis des pli vivoforta kaj potenca. Oni povas diri, ke kiam ĉe la popolo naskiĝis la kastila lingvo, ankaŭ samtempe ĉe la popolo naskiĝis la metrika formo, kiun oni nomas ROMANCO, pri kiu mirinde diris la tutmond fama hispana klasikulo Lope de Vega: «Ĝi certe naskiĝis kiam naskiĝis la vulgaraĵaj idiomoj, dum la semado de la tritiko.» La romano estas metrika formo tiel facila, natura, fluanta kaj alkonformigata al la karaktero de la kastila lingvo, ke ĝi ŝajnas elstariĝi de la prozo mem, kaj estas prozoj kiuj aŭdiĝas verse, romance. Ĝin verkis la popolo, kaj ĝi ĉi tiu ĝin verkis por si mem, interpretante fidele sentojn, kredojn, heroojaĵojn, tradiciojn kaj ŝatataĵojn; oni devas konsideri ĝin reale la vera hispana lirika poezio; ĝi montras forttrajte la karakterizatajn epokojn de la hispanaj Historio kaj Arto, kaj la naturan inklinon de la kastila lingvo, kolektante mirinde la grandiozan hispanan epopeon, kaj se la romano ne donis al ni iun Iliadon, tio estis, ĉar mankis al ni iu hispana Homero, pri kiu modernaj opinioj diras, ke li ne verkis sed kolektis la grekajn popularajn versaĵojn formantajn la Iliadon; sed, kompanse, la romano naskis la komedion, nian popularan kaj gloran teatron nacian. La romano disvastiĝadis tra la tuta Hispanujo same kiel la kastila lingvo, kaj ĉe ĝi oni trovas la unuan ĝermon de la hispana lirika poezio; tial kaj tiel, nepre kaj nature ĝi influis la ceterajn lingvojn, literaturojn, k. t. p.; ĉe portugalaĵojn, ĉar fama portugala verkisto kaj historiisto Oliveira Martins konscias la poemon de Camoens «Os Lusíadas» «la blazono de la Historio de la tuta Hispanujo», kaj pritraktante la religian signifon de la poemo, li diras: «ne estas ĝi partikulara; sed ĝenerala; ne estas ĝuste portugala, sed preskaŭinsula aŭ hispana», ĉar li diras ke tiu religia signifo estas tiel portugala, kiel kastila kaj kiel aragona, laŭ jam estas dirite antaŭe.

Pri la influo oni rimarkos ankaŭ esprimojn de la aŭtoro de la «Popolkantaro de Murcia», sed ankaŭ ĝi evident ĝas per la popolkantoj de la hispana Ameriko, plenaj je ĉarmo, allogo kaj beleco; jen strofo de kuba popolkanto:

«Per la mia testamento
mian koron mi dividis,
por patrin' kaj amatino
po duono mi decidis.»

Estas rimarkinde konstati ian influon sur ĉefan katalunan popolkanton kaj dancon, sur la *sardana'n*, kaj por ĉi tio jen kiel parolis ĉe la

Ateneo de Madrido, je 1921, klera kataluno, Jozefo Subirá, kiu poste eldonis sian prelegon kun la titolo «Pejzaĝo, Kantoj kaj Dancoj de Katalunujo», el kiu mi elĉerpis la jenon (Paĝoj 20-21^a): «La *sardana*, kiel arta muzika valoro, estas modernega, kvankam kiel folkloro danca valoro devenas de tre antikva epoko. Ĝis la mezo de la XIX^a jarcento, la *sardana* havis grandan monotonecon, oni ĝin ludis per kvar tipaj muzikinstrumentoj, kaj ĝi nur konsistis el 24 taktoj. Tiuj melodioj havis foje religian aspekton, alifoje paŝtistan aŭ kamparan; sed alvenis al Katalunujo Ventura, Pep (Jozecjo) Ventura, alinome Pep de la Tenora, kaj lia amo al ĉi tiu danco estis fruktodona.» Ĉi tiu danco devenas de greka kolonio Ampurias (*Emporion*) de la Malnova Epoko. Kaj estas tre rimarkinde, ke Ventura, naskiĝinte en Alcala la Real—provinco de Jaen (Ĥaen), Andaluzio, kaj irinte al Katalunujo, edziĝis kun filino de sardanludestro, lernis notkanton kaj ludi *fluvio'lon* (fluteton) sed malbone; poste li spertadis kaj lernis ludi fluton kaj klarneton, kaj vizitante Perpignan, li interrilatiĝis kun fabrikisto de tipaj regionaj muzikinstrumentoj, el ĉi tiuj la *tenora*, kies sonojn tiel li ŝatis, ke li atingis ludi ĝin arte, kaj li ĝin aldonis al la sardaninstrumentaro, kiu iom post iom riĉiĝis per aliaj instrumentoj. Ventura, samtempe kompletante la sardaninstrumentaron, aliformigis la muzikon, komponante la unuajn longajn *sardanojn*, ĝis kvarcent proksimume, atingante enradikigi sian aliformigon. El la komponitaĵaro de Ventura, nesufiĉe kapabla je tekniko, inspirita ĉu de katalunaj temoj, ĉu de fremdaj operoj, nur meritas atenton pli-malpli deko da *sardanoj*, el ĉi tiuj la titolita «*Per tu ploro*», por kiu verkis versaĵon Johano Maragall. Mortinte Ventura la 24^{an} de marto de 1875, la *sardano* degeneris, sed denove, de antaŭ dudek jaroj potence renaskiĝis. Unu el plej belaj *sardanoj* komponitaj de Morera, plej inspirata sardankomponisto, havas versaĵon de Angel Guimerá, kiu, kiel Ventura, ankaŭ ne estas kataluno.

Fine, tiel ĉarmaj kaj riĉaj estas ĝenerale hispanaj popolkantoj kaj muzikaj motivoj, ke el plej famaj katalunaj komponistoj Isaac Albéniz kaj Enrique Granados trovis inspiron ĉe la andaluzia kaj madrida muzikoj respektive por tutmondfamigi.

Estas konstatite, do, kiel efike influadas eksterkatalunaj fortoj sur katalunajn kantojn kaj muzikon por la gloro de Katalunujo kaj de la tuta Hispanujo.



VIRINOJ DE MURCIA
Tipa kostumo



MURCIIDO: TIPA KOSTUMA

POPOLKANTARO DE MURCIA

Ĉio, kio sekvas, estas tradukita elĉerpitaĵo el la mirinda hispanlingva verko «La Popolkantaro *Panocho*» de Pedro Díaz Cassou kaj de la komponistoj Antonio López Almagro kaj Mariano García López, kiun mi faris kun ilia konsento, pro kio mi ĉi tie esprimas al ili mian profundan dankemon.

En Murcia, la popolkanto estas ĝenerale strofo el kvar versoj kun ok silaboj, kies dua kaj kvara versoj havas nekompletan rimon aŭ asonanon laŭ la kastila natura liriko; tamen, la strofoj povas konsisti el kvin aŭ ses versoj. Krom tiuj strofoj ankaŭ ekzistas la *segidiljo* konsistanta el sep versoj, el kiuj unua, tria kaj kvina estas sepsilabaj, kaj la ceteraj kvinsilabaj; ĝenerale kun malkompleta rimo la dua kaj kvara, kvina kaj sepa, sed la asonanco de ĉi tiuj lastaj estas malsama je tiu de la antaŭaj. Ankaŭ la *segidiljo* povas konsisti el nur la kvar unuaj versoj.

Kelkaj kantstrofoj devenas de tre malnova epoko, de araba poezio tre estiminda al kiu apartenas perfektaj versaĵoj de *Ibn-Chafadeh*, *Ibn-Derradch* kaj *Al-Maccari*, kiel jenaj, kiuj apartenas al diritaj maŭraj verkistoj respektive:

«Ke ni, pro l' patrindecido,
plu parolu malpermesas;
tamen, unu la alian
amon dum dormad' ni jesas.»

«Se ĉe lia la ĝardeno
mastron mian mi ne vidos;
ĉe la revĝarden', sen peno,
man' ĉe mano, ni do sidos.»

«En ĉielo ravege
radias luno,
sed ĝi kaŝas sin baldaŭ
post nigra nubo;
ĉar ĝi vin vidas,
pro ĵaluz' ĝi sin kaŝas
kaj eĉ hontiĝas.»

Oni kantas la du malsamajn strofojn laŭ du taktoj ankaŭ malsamaj: la kvarversajn strofojn laŭ la kanto de Malaga; la sepversajn laŭ alegro. Iuj opinias, ke ĉi tiu lasta estas la indiĝena kanto, kaj la alia enmigranta kanto de Andaluzio, sed oni prave povas konsideri ambaŭ kantojn indiĝenaj, tre malnovaj, sed ŝanĝigantaj, kaj la ŝanĝoj estas la vere enmigrantaj. La sepversa strofo estas por kanti kaj danci, kaj certe ĝin kantis, kaj laŭ ĝia takto dancis, la primitivaj indiĝenoj de la sudorienta Hispanujo sub la helega luno; la kvarversa estas ĝuste por la kanto kaj oni ĝin alnomas kaj iom modifas laŭ la lokoj: *malagenja*, ĉe Murcia kaj *Málaga*; *kartaĝenera*, ĉe *Cartagena*; *granadina*, ĉe *Granada*; *rondenja*, ĉe *Ronda*.

La solaj influoj sur la kantojn de Murcia, estis kastilaj kaj arabaj. Fama dancisto de Murcia, Ludoviko Requejo (Rekaĥo) ŝanĝis laste la sepversan kanton kaj la dancon, kaj li alnomis ĝin «*parranda*» de la

araba vorto **نردّة**, kiu signifas ĝojfesto; tamen estas diversaj *paran-*

doj, el kiuj la plej degeneritaj estas tiuj nomataj de l' *pano rostita*, kiujn oni kutimas danci en Mula. La *parando* estas simila je la *segidiljo*, kaj ĝi estas kanto hispana, kiu alproprigis al si nomon, kies etimologio estas araba; male la *malagenja*, kiun antaŭe oni nomis *caña* (*kanja*), de

la araba lingvo **غشني**, estas certe kanto kaj danco araba alpropriganta

al si kastilan nomon.

Jen «parandoj», nomataj «de l'unu» kaj «de l'tri» respektive, tiel kiel oni kutimas kanti ilin:

«Tio, kion mi ŝatas,
al mi aliras,
al mi aliras:
ĉar', bovinoj, gvidisto...
Mi, do, sopiras!
Ĉar', bovinoj, gvidisto...
Mi, do, sopiras!
Malbona sorto!
Frapu mian animon
ĝis mia morto!

*Frapu mian animon
ĝis mia morto!»*

—
«Jen sub arbo malsana
Marnjo. Domaĝo!
Marnjo. Domaĝo!
Se mi nun kuracisto
estus kun saĝo,
se mi nun kuracisto
estus kun saĝo!
*Jen la rekanto:
salutojn al Jozefnjo
kaj al amanto,
salutojn al Jozefnjo
kaj al amanto.
Aldonaĵ', aldonaj':
Mantelo de Johan'
nun estas en vilaĝ';
vi kuru havi ĝin,
kuradu kun rapid'!*

La muzikaĵo por la «parando de l'nnu» aperas por ĝin ludi per kastanjetoj, *bandurria* (t. e. liuto), malgranda gitaro, kun akraj sonoroj, kaj gitaro, laŭ kutime kaj tipe ĝin ludas la popolanoj.

KANTO DE L' TERKULTURISTO

Ĉiu peniga kamplaboro havas ĉi tie, en *Murcia*, sian propran kanton mildigantan la penadon; la kantoj estas belegaj, kaj ilia toneco tre simila estas; de verso al verso, kun plilongigata fino, estas kantpaŭzo dum kiu la kantanto severalparolas la bestojn, aŭ ekkrias interjekciojn ĉu pli-malpli delikatajn laŭ okazo. Dum la semado, je la sunkuŝiĝo, kiam oni sin sentas laca, kiam la birdoj silentas kaj iuj insektoj serĉas la konvenan lokon por ripozi, kaj aliaj rapidiras sin bani kaj naĝi ĉe la lastaj radioj de l' suno; je la krepuskiĝo, kiam la Naturo eketendas siajn ombrajn vualojn, invitante la homojn fini iliajn laborojn; tiu, kiu plugas, sin sentas inspirata de la bela melankolio de l' vesperiĝo ĉe ĉi tiu terpeco, kaj kurbigita de la manpremado ĉe la plugiltenilo, kantas tiel:

«Kiu plugas kun bovinoj (1)
kaj nur pano lin subtenas,
post la mort' ĉielon iros
ĉar ĉe l' tero tro suferas.»

—
«Di' ĉiela min kompatu,
kia best', ĝi malrapidas:
nemovema, sen la vipo;
malantaŭas, se mi vipas (2).»

—
«Kiu plugas kun mulinoj,
tiun ne doloras penoj;
penoj suferigas tiun
kiu plugas kun azenoj.»

—
«Ne postulas la lernejon
terkulturo de la grundo,
jen scienco: ĝin sulkigi
abundege kun profundo.»

KANTO DE L' RIKOLTANTO FOLIOJN POR NUTRI LA SILKARAŬPOJN

La silkaraŭpo vivas lastajn tagojn, kiuj estas tre krizaj por la sukceso, dum kiuj la zorgoj multobliĝas, kaj atento de l' geedzoj ne sufiĉas preskaŭ por tiuj zorgoj: la edzino konstante staras aŭ sidas ĉiam zorgante ĉe la silkaraŭpejo; la edzo kun korbo dorsen por porti la ŝatatajn de la silkaraŭpo foliojn de l' morusarbo, kies rikolto postulas ankaŭ grandan atentemon por ne detruji la burĝonojn kaj eviti ke la arboj malsaniĝu, ĉar la malsaniĝo okazigas malbonan foliaron, kaj tial malbonan manĝaĵon por la silkaraŭpo.

Je la komenciĝo de l' printempo, dum la matenoj de tiuj krizaj tagoj por la sukcesa vivo de l' silkaraŭpo, ĉe la kamparo, oni aŭskultas

- (1) Kiu plugas kun azenoj
(2) Koncernas azenojn, ĉar koncernante bovinojn la strofo diros:
«nemovema, sen pinĉilo;
malantaŭas, se mi pinĉas.»

kanton de kantanto grimpinta la foliplenan branĉaron de morusarbo, kaŝata de la foliaro; melankolian kanton, iomete malgajan, kiel estas ĉiuj kantoj de *Murcia*, similan je tiu de l' terplugisto, sed samtempe sufiĉe malsaman por veki ĉe l' aŭskultanto aliajn sentojn aŭ ideojn: la kanto de la terplugisto estas tiu de la laciĝo; la kanto de la rikoltanto foliojn estas tiu de la espero kaj de la dubo samtempe; tiu disvolviĝadas kvazaŭ maldiligente; ĉi tiu same dum kantado de l' versoj oksilabaj, vigligante dum la kantado de la kvinsilabaj versoj, kiuj estas kvazaŭ sekvo, sentenco, peto, konsilo, k. c. Fojojn, oni ne kantas la sekvon, sentencon, k. c.

«Kiu rikoltas folion
kaj ĝin detranĉi ne scias,
tiu blindigas burĝonon;
ne plu folioj naskiĝas.

*Arbon atentu:
arbo ne donas,
se malsaniĝas,
silkon tre bonan.»*

«Kiam printempo alvenas,
estas unu nur posteno:
dorsen la korbon vir' porti,
kaj ŝi ĉe l' silkaraŭpejo.

*Se post penadoj,
kion vi celas,
tio, domaĝe,
ve, malsukcesas!»*

Oni diras: «Dio helpas
tiujn, kiuj tre laboras»;
pli, ol ŝi kaj mi nun faras,
ni ne scias, ni ne povas.

*Dio, vi volu
nin nun frakasu,
antaŭ ol same
poste okazu!»*

KANTO DE LA DRAŜISTO

De la brulanta junia ĉielo, la suno de la tagmezo faligas radiojn el fajro en la rerostatan kampon kaj flavajn draŝotaĵojn. Ĉio laciĝas dum angoro de la varmo: birdo, kun beko duonmalfermata, apenaŭ havasflugforton por halti sur branĉo de arbo, ĉe kies folioj, torditaj de l' varmo, insekto apenaŭ trovas ombron, kaj ĉe kies trunkpiedo grupiĝas kortobirdoj kun falantaj flugiloj kaj hundo kun la lango pendanta kaj okuloj ruĝiĝantaj kun fiksata rigardo. Tamen, la murciido, kovrante sian kapon per granda ĉapelo el palmofolioj, vestate de ĉemizego, kies manikoj refaldiĝas supren, kaj de ampleksaj blankaj pantalonoj mallongaj kvazaŭ kalzonegoj, kun kruroj kaj piedoj nudaj, ŝanĝante de mano al mano la gvidrimenojn de la bestoj kaj la vipilon, ĉar ilia malgranda pezo lin laciĝas, ankoraŭ trovas energion por ĵeti en la aeron la kanton de la draŝlaboro. Ne estas ĝi kanto de laciĝo, ĝi estas kanto de fort-konsumiĝo, kiu disvolviĝadas kvazaŭ mortspirante, longedaŭrege, akompanate de la monotona grincado de la nelacigeblaj cikadoj.

Je la fin' de junio
ĉiuj ni draŝas,
kaj rostiĝas la birdoj
ĉar tro sun' ardas (1).
Trotu ĉevalo
kvankam por ni ne restu
greno kaj pajlo!

La rostataj mulinoj
draŝas sub fajro,
kaj ne scias al ili
estos nek grajno.
Trotu! Mi scias
al mi tion, sed draŝas
mi kaj rostiĝas.

Anstataŭ la tri lastaj versoj oni povas kanti la jenajn:
Trotu, ĉar same
estos al mi; sed draŝas,
brulas mi tamen.

(1) Oni povas anstataŭi ĉi tiun verson per «kvankam sin kaŝas».

Kuracist' kaj vendisto,
veterinaro,
pastroj, la ŝtatimpostoj...;
granda domaĝo!
Tion mi diras:
plenan mian rikolton
ĉiuj avidas!

Draŝas pli da mil viroj
nun en kamparo,
ili pensas, mi same,
kaj kun bedaŭro:
estus, do, bono
se ĉe l' poŝo, mirakle,
restus ja mono!

Oni povas kanti anstataŭ la kvar unuaj versoj la jenajn:

Draŝas pli da mil viroj
nune, samtempe;
ili kaj mi pensadas
sammalkontente!

MALAGENJO DE LA EKTAGIĜO

Ankoraŭ oriento ne palpebrumas pro la unuaj lumondoj de l'ektagiĝo: estas je tiuj horoj plej nigraj, plej silentaj, plej endormigantaj, estas je tiuj horoj dum kiuj la nokto estas pli altgrade nokto. Ĉe la malheleco, ĉe l' silento kaj endormiĝemo de ĉiuj kaj de ĉio, aŭdiĝas voĉo, kiun ne akompanas ia muzikinstrumento; voĉo kantas laŭ malrapidega takto kanton, kies melankoliaj akordoj maldiligente aŭdiĝantaj alkonformiĝas al la malgaja kaj kortuŝanta esprimo de la kanto. Ĉi tiu kanto estas la *malagenjo de la ektagiĝo*.

Je l'unua, kok' ekkrias;
bird' alia, je la dua;
je la tria, ĉiuj birdoj;
je la kvara, lumo frua;
dum somer', ni bone scias.

Antaŭ ol naskiĝu tago,
ĉar trankvila valo restas
venas mi, por amon kanti,
mian vivmastrinon festas
mi per ardo de l'imago.

Jen la tria de l' mateno,
katedralhorloĝ' ĝin batas,
vi vekigu, karulino!,
ĉar mi scias, vi min ŝatas,
frue montru vin, jasmeno!

Trafis, je la tria ĝusta,
mia kanto vian liton;
vi vekigu, vi ĝin ŝirmu;
sendas mian la spiriton
kant' de l' mia kavo brusta!

Nokt', ankoraŭ nigra dense,
pluvo trempis min tutplene;
min akceptu ĉe la hejmo,
ĉar suferas mi ĉagrene,
donu amon vi hompense.

ROMANCOJ

La popola kanto de *Murcia* ne riĉiĝis ĝustedirite per romano, ĉar tiu estas pure subjektiva kaj ne koncernas historiaĵojn, heroojn, tradiciojn, k. t. p. Tamen, estas sufiĉe nombraj en *Murcia* la romanoj de maŭroj kaj kristanoj, kaj aliaj, sed ĉiuj, escepte du, estas lokaj kaj ne ĝeneralaj. Kvankam ne indiĝena, disvastiĝis tra la vasta fruktodona valo de *Murcia* romano «La Drapo», kiu ankoraŭ estas tre populara ĉe l' kamparo de *Lorca*; ĉi tiu kanto estas sprita kaj bela, ĝi devenas de la fino de la XVI jarcento:

LA DRAPO

*Juvelist', bonvolu diri
pri necesa l'arĝentkvanto
por vi juveligi kison
de virin' al demandanto.*

Pensis mi pri vi, Sinjoro,
ĉar mi scias, pri ĉi tio
estas granda via scio,
por vi grava la laboro:

Al mi kison de la koro
donis fianĉin' gracie;
ĉar ŝin amas mi pasie,
estu ĝi por mi juvelo,
ĉu l'arĝenton por la celo?
diru, juvelist', konscie.

Havu vi laboron vian,
eĉ pripensu la grandecon,
ne mezuru la ĝustecon
per la via buŝ' en ŝian:
de l'arĝento proporcian
kvanton juĝas mi malmulta,
sed ĉi tio malokulta
estas al vi; diru, gravas,
kisjuvelo jam min ravas,
ĉu l'arĝentokvanto multa?

Kvankam buŝo delikata
donis kison, estis brue,
tial ke min kisis ĝue
belulin' frenezamata
tre gracia kaj laŭdata.

Juvelisto, veron diru,
ĝi el via buŝ' eliru
ne min kalkulante riĉa,
pri arĝentokvant' sufiĉa
por la kis'. Ne mi sopirul'

Bone vi kalkulu mendon:
ne grandegan sumon; male,
vi ĉagrenos ŝin fatale
kaj mi havos grandan plendon,
vi konsciu rekomendon:
ĉar afer' tre malfacila
estas, estu vi subtila,
streĉu vi l'inteligionton
igi kison en arĝenton
de la fianĉin' ĝentila,



I - KANTO DE L' TERKULTURISTO

VOĈO. *(belega!)*
 Ki u plu-gas kun bo-vi-noj

(juvelo!)
 kaj nur pa-no lin sub-te-nas

(he!...)
 post la mort'zi-e-lon i-ras

(venu!) *(haltu!)*
 ĉar ĉel'te-ro tro su-je-ras

Ki-u plu-gas kun bo-vi-noj

II-KANTO DE L' RIKOLTANTO FOLIOJN

VOĈO. *tre longa*
 Ki-u ri-kol-tas fo-li-ojn

longa
 kaj ĝin de-tran-ĉi ne sci-as

longa
 ti-u blin-di-gas bur-ĝo-non

longa
 ne plu fo-li-o nas-ki-ĝas

longa
 Ki-am prin-tempo al-ve--nas

longa
 es-tas nur u-nu pos-te-no

longa
 dor-sen la kor-bon vir'por-ti

longa
 kaj ŝi ĉel'sil-ka-raŭ-ne-jo

III - KANTO DE LA DRAŜISTO

Larghetto.

VOĈO.

First vocal staff on page 34, showing the beginning of the piece with a treble clef and a key signature of one sharp (F#).

Jelaĵin' de Ju

PIANO.

Piano accompaniment staff for the first system on page 34, starting with a piano (p) dynamic marking.

Second system on page 34, featuring a vocal staff with lyrics and a piano accompaniment staff.

ni-o ————— ĉi-uj ni dra-ŝas

Third system on page 34, featuring a vocal staff with lyrics and a piano accompaniment staff.

————— ĉi-uj ni dra-ŝas

First system on page 35, featuring a vocal staff with lyrics and a piano accompaniment staff.

(III)

kaj ros-ti-ĝas labir-doj ————— ĉar tro sun'

Second system on page 35, featuring a vocal staff with lyrics and a piano accompaniment staff.

ar-das

Third system on page 35, featuring a vocal staff with lyrics and a piano accompaniment staff.

La ros-ta-taj mu-li-noj dra-ŝas sub faj-ro —

(III)

dra-ŝas sub faj-ro

p

Kaj ne sci-as al i-li — es-tos nek graj-no —

Detailed description: This page contains a musical score for three systems. The first system has a vocal line with the lyrics 'dra-ŝas sub faj-ro' and a piano accompaniment starting with a piano (*p*) dynamic. The second system continues the vocal line with 'Kaj ne sci-as al i-li — es-tos nek graj-no —' and the piano accompaniment. The third system shows the continuation of the piano accompaniment with some notes marked with downward-pointing stems.

IV - PARANDO DE L'UNU

laŭ oni ludas la poplanoj per Kas-tanjetoj, liuto, malgranda gitaro kun sopranaj sonoraj kaj gitaro.

Allegretto. (♩=144.)

Kastanjetoj

Liuto

Gitaro

Gitaro

Detailed description: This page contains a musical score for four instruments: Kastanjetoj, Liuto, Gitaro, and Gitaro. The score is organized into two systems. The first system includes staves for Kastanjetoj (with triplets), Liuto, Gitaro (with dense chordal textures), and Gitaro. The second system continues the same four instruments, with the Kastanjetoj part featuring more triplet patterns.

(14) *VOÇÓ*

Ti-o ki on mi 3a-tas al mi al-i - ras

(15)

almial-i-ras

(IV) ĉar'bo-vi-nojgvi-dis-to Mi do so - pi - ras

ĉar'bo-vi-nojgvi-dis-to Mi do so - pi - ras

(IV)

Mal-bo-na sor-to

(IV) Fra-pu mi-an a-ni-moŋis mi-a mor-to

Fra-pu mi-an a-ni-moŋis mi-a mor-to

V. PARANDO DE L'TRI

All.^o non troppo. (M ♩ 144.)

PIANO.

roçô

Jen sub ar-bo mal-sa-na Mar-njo Do-ma-ŋo

(v) Mar-njo do-ma-*g*o

Semi nun ku-ra-cis-to es-tus kun sa-*g*o

Se-mi nun ku-ra-cis-to es-tus kun sa-*g*o

(v) Jen la re-

-kan-to sa lu-tojn al Jo-zef-njo kaj al a-

man-to sa lu-tojn al Jo-zef-njo kaj al a-

-man - to Al-do-naj' al-do-naj' Man-te

(r)

-lo de Jo-han' vi tro-vos en vi-laç' vi ku-

-ru ha-vi çin ku-ra-du kun-ra-pid'

VI - MALAGENJO DE LA EKTAGIÇO

Malrapide (♩=76)

VOÇO

PIANO.

(VI)

Je l'u-nu-a kok'ek-kri-as

bird'a-li-a je la du

-a je la tri-a či-uj bir-doj

(VI)

je la kva-ra lu-mo fru- - - a

dum so-mer'nibo-ne sci-as

VII-LA DRAPPO

Allegro mosso.

PIANO.

Piano accompaniment for the first system, featuring a treble and bass clef with a key signature of two sharps (F# and C#) and a 3/8 time signature. The music consists of a steady eighth-note accompaniment.

voce

Vocal line for the first system, starting with a whole rest followed by a melodic phrase.

Ju-ve-list' bon-vo-lu

Piano accompaniment for the second system, continuing the eighth-note accompaniment.

Vocal line for the second system, continuing the melody.

di - ri pri ne-ce-sa l'ar-gent-kvan-to

Piano accompaniment for the third system, concluding the page with a final chord.

First system on page 51, including a vocal line and piano accompaniment. The vocal line has the lyrics: "por vi ju-ve-li-gi ki-son de vi-rin'".

Second system on page 51, including a vocal line and piano accompaniment. The vocal line has the lyrics: "al de-man-dan-to Ju-ve-list' bon-vo-lu".

Third system on page 51, including a vocal line and piano accompaniment. The vocal line has the lyrics: "di-ri pri ne-ce-sa l'ar-gent-kvan-to". The system ends with a double bar line and a fermata. A rehearsal mark "(VII)" is present at the beginning of the piano accompaniment.

HISPANA ESPERANTO-ASOCIO

(H. E. A.)

Se vi estas fervora hispana esperantisto deziranta akceli triumfon de Esperanto en nia lando, vi tuj nepre aliĝu: al H. E. A. pagante la jarkotizon—DU PESETOJN—; al la loka Grupo kaj al la regiona Organizo, abonante la gazeton «La Suno Hispana»—kvar pesetojn; Mar, 23, Valencia—; sed se viaj monrimedoj permesas al vi iun alian elspezon, atentu bone, ke

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(U. E. A.)

(Boulevard du Théâtre, 12, Genève. Svisujo) estas gravega internacia Organizo, kiu sukcese laboras por la triumfo de Esperanto en ĉiuj rondoj de la nuntempa vivo, kaj ke vi devas aliĝi al ĝi pagante KVIN svisajn frankojn, kaj U. E. A. liveros al vi jarlibron kun adresaro de Delegitoj en nombregaj urboj de la tuta mondo, pretaj fari al vi ĉiajn servojn pri komerco, turismo, k. c. Por Hispanoj la kotizo estas ses pesetoj.